


# LA JUNIA VIVO



## MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.  
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

### „FLANKA” VALORO DE ESPERANTO.

Antaŭ kelka tempo estis publikigata en L.J.V. tre interesa letero de s-ro Butler pri la Esperanto-eduko al liaj infanoj. Al ĝi mi deziras aldoni propran sperton: ankaŭ mi komencis paroli kun mia filo en E., kiam li havis apenaŭ tri jarojn, kaj ankaŭ li lernis ĝin tiamaniere unue kompreni kaj poste paroli same kiel ni ĉiuj lernis nian gepatran lingvon. Antaŭ ol li venis en la gimnazion, kie li devis lerni la latinan lingvon, li jam havis firman lingvosenton en Esperanto. Nun mi instruis lin sisteme pri gramatiko. La senescepte konstruita lingvo komprenigas al infano multe pli rapide la esencon de gramatiko ol la neregulaj „naturaj” lingvoj. Post tre mallonga tempo li posedis ĝin kaj tio helpis al li poste ege en la latina lingvo. En dubaj kazoj li ĉiam tradukis la frazon laŭ sia lingvosento en E. kaj sciis per tio tuj, ĉu ekzemple temas pri adjektivo aŭ pri adverbo (tre malfacila distingo por germanlingvanoj, en kies lingvo ili sonas tre ofte same!) kaj li tuj sciis, ke birdo estas bela, sed kantas bele. La kunlernantoj enviis lin pro tio. Foje la profesoro ordonis al li, ke li klarigu al la kunlernantoj, kiamaniere li distingas tion tiom senhezite.

„Mi tradukas la frazon en Esperanton.”

„???”

„En E. ĉiu adjektivo havas la finaĵon a, ĉiu derivita adverbo la finaĵon e. Se mi devas diri a-vorton, do estas adjektivo, kaj se mi bezonas e-vorton, estas adverbo.”

La profesoro respondis nenion, sed poste li diris foje al mi:

„Mi estas „kompreneble” kontraŭulo de artefarita lingvo, „kiu neniam havos signifon” k.t.p., sed en la kazo de via filo mi vidis, ke io tia tamen povas havi ian „flankan valoron”.”

Jen atentigilo por la E. parolantaj gepatroj (kies filoj, strange, ofte ne parolas Esperanton!)

Erika Linz, Praarbaro ĉe Caragüatutuba, Estado de São Paulo, Brazilo.

## KIO ESTAS KNABO?

En malgranda amerika perioda revuo mi legis la artikoleton „What is a boy?” (= Kio estas knabo?) kaj mi tradukis ĝin por „La Juna Vivo”. (B. d. R.)

Knaboj ekzistas en multaj formatoj, pezaj kaj koloroj. Oni trovas ilin ĉie: supre, malsupre, interne, grimpante, balancante, sencele promenante aŭ saltante.

Patrinoj amas ilin, knabinoj malamas ilin kaj la ĉielo protektas ilin. Pli aĝaj gefratoj toleras ilin, junuloj ignoras ilin.

Knabo estas Vero (kun malpurajoj sur la vizaĝo, Saĝo (kun maĝumo en la haroj) kaj Espero de la estonteco (kun rano en la poŝo).

Knabo havas la apetiton de ĉevalo kaj la digeston de glavoglutanto; la energion de poŝformata atombombo, la scivolemon de kato, la pulmojn de diktatoro, la fantazion de Jules Verne, la timemon de violeto, la bravegon de ŝtala policisto, la entuziasmon de petaro.

Kiam li konstruas ion, li havas kvin dikfingrojn sur ĉiu mano.

Li kruele batas sian kapron, sed li serĉas la plej bongustajn manĝaĵojn por ĝi.

Li ŝatas glaciaĵojn, tranĉilojn, segilojn, kristnasktagojn, komikajn librojn, la knabojn en la strato, arbarojn, la akvon de lago aŭ rivero, grandegajn bestojn, paĉjon, vagonarojn, flugmaŝinojn, sabatojn kaj fajrestingajn pumpilojn.

Li ne tre ŝatas la dimanĉlernejon, societon, lernejojn, librojn sen bildoj, muziklecionojn, kravatojn, hartondistojn, knabinojn, junulojn kaj enlitiĝon.

Neniu ellitiĝas tiom frue kaj venas tiom malfrue por vespermanĝi.

Neniu povas meti en unu poŝon tiom: rustoplenan tranĉilon,

duone formanĝitan pomon, metron da ŝnuro, malplenan alumet-ujon, du gumbuletojn, ses cendojn, katapulton, pecon de nekonata materialo kaj aŭtentikan superstiĉan kodoringon kun sekreta fako.

Knabo estas magia estaĵo: vi povas sendi lin el via laborejo, sed vi ne povas eksigi lin el via koro. Vi povas malpermesi al li eniri vian studĉambron, sed vi ne povas malpermesi al li eniri vian animon.

Kiel ajn, vi cedas: li estas via kaptisto, via gardisto, via ordonanto kaj via estro, tiu peco da bruoj kun la lentuga vizaĝo.

Sed kiam vespere vi venas hejmen kun frakasitaj esperoj kaj revoj, li povas forigi ilin per du sorĉovortoj: „Halo, Paĉjo!”

El la angla lingvo tradukis Inĝ. B. B. de Regt, Rotterdam, Nederlando.

## LA FORVETURO DE KAPITANO BONNINGA AL ANGLUJO.

La „Corsica” spitas malamikojn, minejojn, ventegojn.

Kiam en la jaro 1941-a la motorbordŝipo „Corsica” estis konfiskata de la Germanoj kaj transportata al Norvegujo, komenciĝis por la posedanto, ŝipestro kaj por liaj ŝipanoj tempo, en kiu ili forkonsumiĝis pro indigno. Indigno pro la ŝipo, pro la fakto, ke ĉi tiu ŝipo estis misuzata, sed precipe indigno pro tio, ke iliaj unuaj klopodoj por forkuri ne sukcesis.

Kapitano Bonninga kaj liaj homoj estis mastroj en la arto de intenca fuŝado (sabotado) kaj sukcesis teni la ŝipon dum kelkaj jaroj en preskaŭ daŭra riparo. Ĉiam estis iu ajn difekto en la maŝino kaj ĉiam ekaperis iu ajn malperfektaĵo je la „Corsica”. La atendado je ŝanco preskaŭ fariĝis obsedo por ĉi tiuj nederlandaj maristoj. La oleo estis kaŝita en sekretaj ujoj, pri kiuj la germanoj ne sciis. Kaj ne estis malmulte: ekstra kvanto de dek kvinmil litroj. Kiel ili akiris tion, estas aparta historio.

La ŝanco venis je la sesa de aprilo, 1945.

En Solvaer la „Corsica” estis plenŝarĝita per fiŝaĵo, destinita por Drontheim. Je la deka matene ĝi forveturis kaj je la dek tria horo ĝi estis ĉe la albordiĝejo de Nordskott. La aero estis neĝoplana.

La 8-an de aprilo je la 19-a horo kaj 20 minutoj oni pasis Korvikon. La vetero estis malbona; pluvo kun forta vento el la sudokcidento. Antaŭ Folla la maro estis malkvietega, la luno estis malplena. Je la 21-a horo oni venis al la albordiĝejo de Finmarger.

Ŝipestro Bonninga mallevigis la maston por havigi dum la forkuro kiom eble plej malmultan vidon al submarŝipoj. Pluvegis kaj estis ege mallume. En la lasta momento la direktilisto estis tiel surprizatakata de kardialgioj<sup>1)</sup>, ke li devis deŝipiĝi. Li senprokraste kaŝiĝis, sed li malbenis sian sorton, kiu devigis lin resti malantaŭe.

Norvega familio estis implikata en la sekreto kaj helpis. Oni interkonsentis, ke, se la klopodo malsukcesus, tiam oni subakvigus la ŝipon.

La forveturo estis malfacila en la mallumo. Ne eblis uzi la lumjetilojn en ĉi tiuj cirkonstancoj. Kaj troviĝis danĝeraj malprofundaĵoj. Ŝipestro B. tamen bone rondiris la naĝbarelojn kaj dank' al sia kono de ĉi tiu veturvojo li sukcesis.

Tuj kiam la ŝipo enveturis la profundan fjordon, oni direktis baborden por eviti, ke la germana gardistaro sur monto je tri-bordo rimarku ion. La „Corsica” pasis tiun gardistaron je distanco de 800 metroj.

La veturado restis malfacila. Pluvegis, mankis navigacilumoj kaj okazo por ŝipestro B. por malsupreniri por konsiliĝi kun la markonisto. Sed la direktojn kaj malprofundaĵojn li bone tenis en la kapo.

Oni atingis la lokon Falla en forta kontraŭvento kaj la maro daŭre plimalkvietiĝis. La ŝipo ege tangadis kaj la streĉiĝo kreskis, kiam oni devis pasi la danĝerajn rokojn. Momenton poste la „Corsica” enveturis la minejon. Estis mallumege, tiom mallumege, ke la ŝipanoj ne plu vidis eĉ la antaŭŝipon.

En ĉi tiuj momentoj la streĉiĝo estis grandega.

Ĉu la forkuro jam estas malkovrita? Ĉu ili estas persekutataj? Ĉu la ŝipo trafos minon? Ĉu ekzistus ŝanco atingi la alian marbordon? La bordon, kiu ankoraŭ estas tiom malesperige malproksima!

Tion la anoj de la „Corsica” certe centfoje demandis al si, sed ili ne parolis pri tio. Cetere, reiri ne plu eblis.

La unua malbonŝanco komenciĝis, kiam la ŝipo atingis la plenmaron. La ellasejo de la motoro ekbrulis kaj disjetadis pluvon de fajreroj, kiu lumigis la tutan malantaŭŝipon. Oni igis la motoron turni malrapide kaj maristo pendigis malsekan sakon super la ellasejo por tiel kapti la fajrerojn. Tio ne sukcesis, tamen baldaŭ la brulo finiĝis.

Oni demandis sin, ĉu ĝi jam estas ekvidita.

Preskaŭ ne povis alie kaj vere ..... tie ekaperis lumo, rekte malantaŭe!

Daŭrigota.

1) Kardialgio = doloro en la regiono de la koro kaj la stomako.

## Al gek-doj, kiuj korespondis kun mi antaŭ tri jaroj.

Karaj gefratoj, denove mi povas skribi al vi.

En la koro mi havas tiom por diri, sed kun la plumo en mia mano, mi ne scias kion skribi al vi.

Sed mi tamen skribas, ĉar vi, karaj ge-amikoj, en la pasintaj tagoj fervore korespondis kun mi. Kaj eĉ en la longa trijara tempo vi daŭre sendis al mi viajn frataĵojn.

Eble kelkaj el vi opiniis strange, ke ne venis respondo. Sed vi ne sciis, ke tiam mi jam estis arestita. Longe mi vivis en malluma infero kaj jam pensis, ke mi ne povos eliri.

Nun mi povas vivi kaj labori sub la suno kaj skribas denove al vi. Kiel vi fartas? Mi sopiras scii pri vi kaj volonte korespondos kun vi. Mi atendas vian leteron. Ĉu vi interesiĝas pri Popola Ĉinio?

Saluton, sincere via Zekun (p. a. „El Popola Ĉinio”, 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinujo).

## Al Ski-amantoj kaj Montaramantoj.

De la 24-a de decembro ĝis la 2-a de januaro okazos esperantista ski-renkontiĝo en Meribel les Allues, Savoie, Francaj Alpoj, apud Brides les Bains, en Tarentaise.

Oni dormos en komunaj dormejoj. La nutraĵoj estos simplaj, sed abundaj kaj variaj. — La kompleta restadprezo estos 6000 fr.fr.

La nombro de partoprenantoj estas limigita je 20 personoj. Kiu do deziras partopreni, senprokraste anoncu sin (samtempe pagante la restadkostojn) al: **S-ro E. Bidoit, instruisto, 38 rue Chabaud, Reims, Marne, Francujo, CCP: Châlons s/Marne 185-34.** — Li (ŝi) samtempe sciigu, kion li ŝatas en la vesperaj programoj: ĉu kantadon, prelegojn, diskutojn, ludojn, kurson.

## I.L.E.I.-RUBRIKO.

(Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Ned. Centra Informejo: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo).


En nia septembra numero ni menciis leteron de Eduka Fakto de Unesco kaj promesis presigi ĝin poste. Jen ĝi estas:

La 4-an de aŭgusto 1950.

Unesco  
19, Avenue Kleber.

Mesaĝo de la Direktoro de la Eduka Fakto de Unesco.

Mi tre ĝojas akcepti la inviton de via prezidanto, ke mi sendu al vi mesaĝon de bonvolo dum vi kunvenas por la Internacia Kunsido de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Mi faras tion ne nur ĉar via laborado, kiel la nia, sin dediĉas al la progresigo de Internacia interkompreniĝo, sed eĉ pli, ĉar unu el la temoj de



via diskutado estas unu pri kiu Unesco estas precipe interesata, nome „Kiel disvolviĝi Internacian Kompreniĝon en la Klasĉambro”.

Kompreneble estis granda disputado rilate la pretendon de Esperanto, esti akceptata, kiel universala helplingvo, kaj mi devas atentigi vin, ke rilate tiun teknikon aferon, Unesco ne sin ligis kun la vidpunkto, kiun vi sendube volus.

Tamen via praktika klopodado pliiĝi internacian kompreniĝon pere de la instruado de Esperanto en lernejoj nepre postulas nian konsenton, ĉar nia celo, kiel la via, estas malgrandigi la barilojn de lingvo kaj antaŭjuĝoj, kiuj nuntempe apartigas infanojn kaj plenaĝulojn en diversaj landoj. Ĉio, kion oni povas fari pere de instruado kaj eble precipe pere de la instruado de lingvoj, por helpi al infanoj konstati, ke ili estas mondinfanoj, estas gajno por la paco.

La aŭtoro de Esperanto, d-ro Zamenhof, estis antaŭ ĉio inspirita de ĉi tiu idealo. Ĉi tiu idealo, sen konsidero al ĉiaj teknikaj, lingvistikaj demandoj, estas la „Interna Ideo” de via movado.

Antaŭ ĉio vi estas instruistoj pri Esperanto kaj certe ne estas pli bona loko ol la klasĉambro en kiu prepari la hodiaŭan infanon estiĝi la internacia civitano morgaŭa.

Mi, do, havas la grandan plezuron deziri al via kunveno plenan sukceson.

Subskribita: Lionel Elvin.

Ni atendas pliajn artikolojn por nia rubriko. Karaj gehelpantoj .....  
kie vi estas??

Elspezu almenaŭ la koston de unu poŝtmarko por sciigi, ke vi legas nian rubrikon, ĉu vi satas ĝin aŭ ne kaj kiamaniere vi volos aranĝi ĝin. (Red.)

## Kontakto inter diversnaciaj lernejoj per esperanto.

En Nederlando oni renoviĝas la lernejan instruadon. Versajne ankaŭ en aliaj landoj.

Oni deziras pli viviĝi la instruadon kaj pliaktivigi la gelernantojn. Ekzemple instruante la geografion, la instruisto igas siajn gelernantojn desegni geografian karton de iu regiono aŭ lando sur unu folion kaj sur aliajn foliojn glui uzitajn poŝtkartojn aŭ gazetteltranĉaĵojn kun bildoj de urboj, vilaĝoj, pejzaĝoj k.t.p. de la koncerna regiono aŭ lando. Aldoninte subskribojn aŭ pli detalajn klarigojn sur apartaj folioj, ĉiu lernant(in)o kunmetas per tiuj folioj albumon pli malpli aŭ tute ne kompletan. Ĉiu infano tre fieras pro tia mem farita albumo kaj agante lernas. Tia lerniga agado multe pli efikas ĉe la pli granda parto de la infanoj ol la senaga aŭskultado, kiun oni antaŭe aplikis.

Por kunmeti album(et)on pri alia lando, la gelernantoj bezonas ilustran materialon: poŝtkartoj ilustritaj, gazetteltranĉaĵoj, bildoj el ilustritaj revuoj.

Diversnaciaj lernejoj povus grave helpi unu la alian, se Esperantisto samloka, instruisto aŭ ne, pretas peri.

La lernejestro de nia vilaĝo, ne-Esperantisto, turnis sin al mi por akiri per mia helpo por siaj gelernantoj materialon ilustran el Danujo, Svedujo, Norvegujo, Finnlando, Polujo, Ĉeĥoslovakujo, Italujo, Hispanujo, Portugalujo kaj Francujo. Li jam havas el Usono, Britujo kaj Belgujo. Li igos siajn gelernantoj kolekti materialon pri nia lando por sendi kvanton al sendinta alilanda lernejo. Mi zorgos pri la traduko de la mallongaj klarigoj el Esperanto kaj en Esperan-

ton. Tiel ni, Esperantistoj, povos fari gravajn servojn por la tutmonda infanaro, la nova generacio. Imitinda agado.

Kiu instruisto el supre menciitaj landoj bonvolos kolekti materialon pri sia lando kaj sendi ĝin al mi por poste kompense ricevi materialon pri nia lando?

Antaŭdankante pro la montrata kunlaboro, kore salutas

S. S. de Jong Dzn., delegito de U.E.A., Waltaweg 3, Tjerkwerd (Fr.), Nederlando.

## Karaj Lernejanoj,

En julio ni promesis premion al tiu, kiu verkos la plej interesan verkaĵon pri sia ferio.

Ĝis oktobro ni ricevis nenion, do — la premio restis ĉi tie.

Feliĉe, finfine Ann Wilson en Northfield (Birmingham, Anglujo) havis kuraĝon! Ŝi faris tre belan verkaĵon pri sia ferio en Konstanz.

Ann do gajnis la premion: la Fabelojn de Andersen.

Ĉu ĝi plaĉis al vi, Ann?

Via verkaĵo verŝajne aperos en la venonta numero de nia gazeto. Vi vere bonege verkis ĝin! Ĉu vi faris ĝin tute sola? Ĉu vi ankaŭ tiel bone povas paroli Esperanton? Tiam vi certe multe babilis kun eksterlandaj geamikoj, kiuj estis en Konstanz, en la I.J.K.!

Gratulon ankaŭ al Mieke Ridderikhof, en Hilversum (Nederlando), kaj Beryl James, en Birmingham (Anglujo). Ili gajnis premiojn en la konkurso de septembro. Mieke Ridderikhof estas nur 9-jara! Bonege, Mieke!

Estas bedaŭrinde, ke ĝis nun ne ĉiuj lernejanoj partoprenas en la konkursoj. Faru vian eblon! La serĉado estas bona ekzerco, kaj vi povas gajni belajn premiojn!

N. K.

## Karaj lernantoj,


Ni komencis lerni Esperanton. Ni estas dek unu el la oka klaso de la popol-lernejo en Schwenningen. Ni lernas diligente kaj esperas, ke ni povos baldaŭ skribi pli longan leteron.

Ni ĝojus pri via respondo kaj salutas vin kore: Hans Schröwe, Ernst Tirnkorn, Kurt Maier, Karl Erchinger, Karl Link, Heinz Heim, Helmut Heinzelmann, Ulrich Ngwiger, Werner Seckinger, Günter Ketterer, Walter Tauch. — Ni petas vin, skribu vian respondon al: Ernst Tirnkorn, (14b) Schwenningen a. N., Rottweilerstr. 125, Germanujo.

**Subtenu la Internacian Junular-Laboron. Mendu viajn librojn ĉe la TJO-Libro-Servo, M. Tinxgracht 10, Edam, Nederlando.**

# NIA VERKILO.

## La vilaĝo.



1.

Skribu frazojn pri ĉi tiu bildo aŭ pri la vilaĝo, en kiu vi loĝas!



2.

Frazojn pri la bildo aŭ pri via urbo.

### Karaj junaj geamikoj:

Antaŭ la somera libertempo mi demandis al vi: Skribu sur bildkarto kie vi estis en via libertempo, aŭ kion vi faris. Mi opinias, ke vi ĉiuj havis tro multe da laboro, ĉar nur du leterojn mi ricevis.

Dankon al Monique Vigan (Morteaux-Couliboeuf, Francujo) kaj Claudine Legret (Vire, Francujo). Ambaŭ mi renkontis persone; ĉu vi bone fartas?

Kiujn nomojn mi povos presigi en la sekvonta numero? Ĉu vi forgesis mian adreson? Bedaŭrinde! Nu, jen ĝi estas: P. Korte, Schoolstraat 13, Veendam, Nederlando.

### Du verkajoj de etuloj.

Kiam mi estos granda, mi veturos per motorŝipo al malproksima lando, al Japanujo. Tie certe estas multaj bongustaĵoj. Mi aĉetos kaj poste reveturos hejmen.



Sur la kajo atentos mia edzino kaj miaj infanoj kaj mi gaje salutos ilin.

Ake, 8-jara.

La pasintan someron mi vizitis mian avon.

Ni ludis en la fojnejo. Du knabinoj falis. Poste ili rampis sub la fojnon kaj ni tre timis, kiam ni ne vidis ilin.


Ni faris kavon, el kiu ni preskaŭ ne povis elrampi.

Du knabinoj kune glitis malsupren.

Margareta, 8-jara.

(La du supraj verkaĵoj estas verkitaĵ laŭ la Freinet-metodo de lernantoj de f-ino Hakansson, Enskede, Svedujo).

### Kverelo sur la fenestro-breto (fino).



Kiom babilis tiuj floroj! Oni pritraktis ĉiujn parencajn aferojn. La kaktos kaj la ciklamo ne kuraĝis diri eĉ unu vorton.

Kiom da koloroj, kiom da formoj kaj kiom da agrablaj odoroj! La hiacinto ne mensogis. Ili ne plu mokos pri ĝi.

Tiam la preĝeja sonorilo batis: Unu, du .....

Jen jam estis la luno kun sia radio. Ĝi ne plu estis tiom malmola kaj glata. Rapide la floroj glitis sur ĝin. Ili kriis „Adiaŭ!” al la hiacinto kaj kapsalutetis al la du aliaj.

Tri, kvar .....

Jen ili glitis .....

Kvin .....

„Adiaŭ, galantoj!”

Ses, sep .....

„Fartu bone en la malsanulejo!”

Ok, naŭ, dek .....

La florbutiko ree estis plena.

Dek unu .....

La fenestro-bretoj ree estis plenaj .....

Dek du .....

La lunradio degelis kaj ne povis porti plu eĉ floketon.

La festo pasis. Hiacinto ree estis sola kun siaj najbaroj. Sed nun ĝi havas agrablan rememoron.

Kiam la sekvan matenon la sinjorino venis en la ĉambron, ŝi diris:

„Kiom agrable odoras tiu sola floro!”

La sinjorino sciis nenion pri la granda vizito .....

El le lerneja gazeto de Edam, Nederlando.

### Sankta Nikolao.

En la vespero antaŭ Sankta Nikolao iras tra vilaĝoj kaj urboj Sankta Nikolao kun anĝelo kaj diablo.

Sankta Nikolao havas blankan veston, sur la kapo oran ĉapon (mitron) kaj en la mano oran episkopan bastonon.

Ankaŭ la anĝelo havas blankan veston. Li havas malantaŭe, sur la ŝultroj, belajn flugilojn kaj en la mano korbeton kun donacoj.

La diablo estas nigra; li havas longan, nigran voston, sur la kapo kornojn kaj en la buŝo longan, ruĝan langon. En unu mano li havas ĉenon, per kiu li krakas, kaj en la alia mano vergon, per kiu li batas la malobeajn infanojn.

Sankta Nikolao per sonorilo anoncas, ke li alvenas.

La infanoj genuas kaj preĝas, por ke Sankta Nikolao donu donacojn al ili.

Se la patrino diras al Sankta Nikolao, ke la infano estis obeema, ĝi ricevas de li belan donacon: sukeraĵon aŭ libron. La malobeajn infanojn batas la diablo per vergo kaj li donas al ili karbon aŭ malbelan terpomon.

Bohumil Slavik (lernanto de s-ro Bobek, Turnov, Ĉeĥoslovakujo).

### La Simio.

„Patro, bonvolu doni al mi guldenon. Tiam mi aĉetos malgrandan simion.”

Patro: „Ni jam havas simion, tio estas vi!”

„Tiam bonvolu doni al mi 25 cendojn por aĉeti nuksojn por tiu simio!”

## LA AMIKA LETERO.

El la okuloj de Julie Ann falis varmegaj larmoj. Ŝi rulis la paperfolion en buleton kaj ĵetis ĝin en la paperkorbon.

Tion ŝi ne povas plenumi. Ĉu tio ne estas troa postulo de la instruistino, doni tian malfacilan hejmtaskon?

Ŝi devas skribi amikan leteron al knabo aŭ knabino en Aŭstralio. Ĉiuj en la klaso devas skribi unu kaj la plej bonajn oni elektos por forsendi. Se la leteroj estos sufiĉe bonaj, eble la knaboj kaj knabinoj el Aŭstralio respondos al ili, diris la instruistino.

Sed Julie Ann scivolis, kiel ŝi povos skribi amikan leteron al iu, kiun ŝi neniam vidis.

Aŭstralio estas malproksima kontinento. Ĝi kuŝas mejlojn kaj mejlojn de Indiana en Usono. Kia popolo vivas en Aŭstralio? Certe tie estas kanguruoj .....

Subite Julie Ann ekridetis kaj ĉiu sento de kolero iris for. Ŝi demandos pri kanguruoj! Eble tiu knabino havas unu kiel ludbeston. La idoj certe estas ĉarmaj. Ŝi sentis sin feliĉa, kiam ŝi skribis:

„Kara amikino en Aŭstralio, mi vivas en Selby, Indiana. Mi estas dek-unu-jara kaj sidas en la sesa lerneja klaso. Ĉu vi ŝatas ludi kun kanguruoj? Mi pensas, ke povas esti amuze, se oni havas unu kiel ludbeston.

Via amikino, Julie Ann Smith.”

La instruistino mienis serioze, kiam ŝi legis la leteron de Julie Ann.

Ĝi estas tro mallonga. Vi skribu pli multe pri vi mem,” ŝi diris al Julie Ann.

„Sed la tuta afero ne interesas min,” diris Julie Ann. „Kaj mi deziras scii ion pri la kanguruoj.”

La instruistino ridetis. Ŝi ja estis ĉarma.

„Se vi vere deziras tion, do bone, tiam ni sendos ĝin. Eble iu rakontos al vi pri kanguruoj.”

Ŝi donis al Julie Ann nomon kaj adreson kaj montris al ŝi, kiel ŝi adresu la koverton. La poŝtmarko kostas kvin cendojn.

Julie Ann sciis, ke daŭras longan tempon por sendi leteron al Aŭstralio kaj eĉ pli longan tempon por ricevi respondon. Sed la tagoj pasis kaj ŝi jam perdis la esperon ricevi respondon. Certe la instruistino tamen pravis. Ĉiuj aliaj en la klaso jam ricevis respondon, sed ŝia letero ne estis interesa. Vere, ĝi ne estis amika letero.

Sed Julie Ann malpravvis, ĉar unu tagon stranga koverto kun stranga poŝtmarko atendis ŝin, kiam ŝi venis hejmen de la lernejo.

„Grava letero por vi!” diris la patrino.

„Jes”, ekkriis Julie Ann. „Ho jes! Ĝi estas grava!”

Ŝi zorge malfermis ĝin.

„Kara Julie Ann,” ŝi legis. „Ankaŭ mi estas dek-unu-jara. Kaj mi vivas en Sidney. Mi ankoraŭ ne vidis kanguruon. Nur en zoologia ĝardeno. Sydney estas granda urbo kun domegoj, magazenoj, aŭtomobiloj kaj trotuaro. Mi pensas, ke eksterurbe, inter la montoj, eble vivas sovaĝaj kanguruoj, sed ni neniam vidas ilin.

Rakontu ion pri Indiana. Ĉu estas tie grupoj da indianoj? La indianaj beboj certe estas ĉarmaj.

Via aŭstralia amikino:  
Anna Benner.”

„Ho!” ekkriis Julie Ann. „Nun ne estas sovaĝaj indianoj en Indiana. Kiom ridindan penson ŝi havas tie!”

„Ne pli ridinda ol via penso, ke kanguruoj estas en aŭstralia urbo”, diris la patrino.

Julie Ann kapjesis.

„Mi ĝojas, ke mi divenis tion.”

„Tio estas ĉarma, amika letero”, diris la patrino.

„Sed nun mi devas skribi al la aŭstralia Anna kaj rakonti al ŝi, kiel nun estas la vera Indiana.”

Tiam Julie Ann eksilentis, ĉar ŝin kaptis nova ideo.

„Patrino, mi pensas, ke mi nun scias, kio estas amika letero. Al ĝi oni deziras respondi.”

Laŭ rakonto en la usona infangazeto „Wee Wisdom” de Beatrice Yearian esperantigis P. B.

**Noto:** La „Wee Wisdom” organizas tutmondan infanan klubon (por anoj ĝis 12-j.), kies membroj interkorespondas. Ili ĝis nun uzas nur la anglan lingvon. Petu specimenon de la eldonejo: 917 Tray Av., Kansas-City 6 MO., U.S.A. Rakontu pri Esperanto por infanoj. Eble oni aperigos vian leteron.

### Sanco, ankaŭ por vi!

Kiu antaŭ la 1-a de januaro 1951 varbos almenaŭ 3 abonantojn je „La Juna Vivo” ricevos surprizon. Kiu entute varbis la plej multajn krome ricevos premion!

Do — ĉiu eklaboru! Ĉiu nova abonanto ricevos la decembran n-ron senpage. La nura kondiĉo estas, ke ni kun la aliĝiloj samtempe ricevas la jarkotizon, aŭ almenaŭ pruvon de la varbint(in)o, ke li (ŝi) enkasigis la kotizojn.

# KONKURSRUBRIKO.

## Raportoj:

1. Bedaŭrinde mi ricevis nur 24 provojn de Tinker's Farm (Birmingham, Britujo) kaj 5 el Hilversum (Nederlando). Sed ili estis bonaj kaj mi gratulas ĉiujn, aparte la naŭjara Mieke Ridderikhoff, eĥ Hilversum, kiu gajnis la premion kaj Dorothy Weeks en Tinker's Farm.

A. E. Booy.

2. Raporto ne ricevita.

3. Mi ĝojis ricevi provon el Berlino. Tie estas grupo, kiu uzas „La Juna Vivo”n, do ni povas atendi pluajn provojn. Ne sufiĉe multaj personoj partoprenas, do ĉi tiun fojon, la temo estas pli facila. La premion gajnis Beryl James (Tinker's Farm).

J. G. Robins.

## Novaj konkursoj:

I. (Ĝis unujara lernado): Kiom da arboj estas kaŝitaj en la sekvantaj silaboj? Uzu ĉiun silabon nur unufoje:

Frak — io — ano — lar — pres — sen — ik — kver — kaŝt — o — ul —  
o — bet — il — as — no — mo — ul — sal — o — ko — pop — ek — lo —  
so — fa — til — io — o — go — o — ci — pi — ik.

Sendu vian provon antaŭ la 18-a de decembro al f-ino A. E. Booy, 96 Mansel Road, Birmingham 10, Anglujo.

III. (Por ĉiuj): Priskribu vian vivon en la lernejo, familio, kaj tiel plu, sub la titolo: „Bildo de mi mem.”

Sendu vian provon antaŭ la 18-a decembro al F-ino I. G. Robins, 64 Aldridge Road, Birmingham 22 b, Anglujo.

**Noto de la redakcio:** Bedaŭrinde ni de s-ro Moir por grupo II ne ricevis novan konkurson, nek raportojn pri la du antaŭaj konkursoj.

**Konkursreguloj:** Skribu klare: 1. vian nomon; 2. vian naskiĝdaton; 3. dum kiom da tempo vi studis esperanton; 4. la nomon aŭ specon de via lernejo; 5. vian adreson. — Via instruisto aŭ unu el viaj gepatroj devas deklari, ke ĝi estas via propra (senhelpa) laboro.

**Premioj por Konkursoj:** Britoj povas ion elekti el la katalogo de la Brita Esperanto-Asocio ĝis la valoro de 2 ŝ. 6 p. por Konkurso I; ĝis la valoro de 3 ŝ. por Konkursoj II kaj III. Adreso: 140, Holland Park Avenue, London W II. En aliaj landoj la premio-gajnintoj devas elekti unu libron el jena listo:

Konkurso I: „Esperanto por Infanoj” (Salomon), legolibro, aŭ „Komuna Kantlibro” (Holmes) kantoj kun muziko aŭ: „A.B.C. Libro”, rimajoj kaj bildoj.  
Konkurso II: „Tejo kaj Ĉerik” (Toms), historietoj, aŭ „Johano kaj Silvio” (Betts) legolibro kun angla vortaro aŭ „Negulino” (Grimm) aŭ libro el Konkurso I-listo.

Konkurso III: „Kudlago, la malgranda Eskimo” (v. Hichtum), aŭ „Pinokjo” (Collodi) aŭ „La Nova Testamento” aŭ libro el la listoj por I kaj II.

Kiam vi scias, ke vi gajnis premion, skribu tuj al la Brita Esperanto-Asocio kaj sciigu tion. Elektu la libron, kiun vi preferas.

(Sekretariino: *Helmi Veldhuyzen, Hoŝ v. Delftlaan 79, Delft, Nederlando.*)



Kun granda ĝojo ni povas sciigi al vi ke nia ĉina ĉefperanto, kiu dum pluraj jaroj pro sia Esperanto-agado estis en mallibereco, denove skribis al ni. S-ano Zekun jam eklaboris kun granda entuziasmo. La adreso: S-ro Zekun, 26 Kuo Hui Cheih, Peking, Ĉinujo

Nia **irlanda** ĉefperanto, s-ro Seosahm O'Conaire, devas pro malsano ĉesigi ĉiun laboron kaj ne plu povos funkcii kiel TJO-representanto. Ni dankas al li pro ĉiu laboro, kiun li faris por Esperanto kaj precipe por TJO kaj ni deziras al li baldaŭan kaj plenan resaniĝon.

Irlandanoj, ĉu inter vi ne troviĝas entuziasmulo kiu povus transpreni lian taskon?

Ankaŭ nia peranto en **Ĉeĥoslovakujo**, s-ro Mašek, ne plu povos labori por TJO. Ankaŭ al li ni esprimas nian koran dankon pro lia agado. Kiu junul(in)o en ĈSR povos anstataŭi lin?

La **pola** peranto edziĝos en decembro. Kvankam ni estas ankoraŭ iom fruaj, ni gratulas al la juna paro en la nomo de ĉiuj TJO-anoj.

Ĝis nun TJO havas ĉefperantojn en 13 landojn. Ni volonte pligrandigos tiun nombron. Kiuj gejunuloj volas reprezenti nin ekzemple en Finnlando, Svedujo, Norvegujo, Islando, Japanujo, Nov-Zelando kaj en la diversaj landoj de Sud-Ameriko?

**Tre grave.** Nia organizo posedas ankoraŭ grandajn bonhavojn en landoj, de kie ne eblas transigi monon al Nederlando. Precipe en Ĉeĥoslovakujo kaj Brazilo ni havas grandajn sumojn. Kiu scias solvon por tiu problemo interkontaktu kun nia kasisto: s-ro G. Timmerman, J. Oldenburglaan 17 A, Bergen (NH), Nederlando.

Anoj en nepagipovaj landoj ankaŭ mem esploru la eblecojn pagi al ni, per internaciaj respondkuponoj aŭ alimaniere.

En Jugoslavujo la oficialaj instancoj helpas transigi la monon, necesa por 15 anoj. Klopodu ion similan ĉe viaj naciaj bankoj.

**Respondo de UN:** En sia letero de la 25-a de oktobro 1950 UN danke konfirmas la akcepton de la pacdeklaro, redaktita dum la IJK en Konstanz kaj subskribita de la partoprenintoj. Unesco transprenis la proklamon por plua prilaborado.

## POSTMARKRUBRIKO.

Ĉi tiun fojon tri sendaĵoj el Germanujo: de Michel Schmidt, Heinz Siemens kaj Schaedel.

Unu leteron ni ricevis el Francujo, de s-ro Thebaud, unu el Maroko (f-ino Zarca), du el Nederlando (s-roj Hamar kaj de Haan), unu el Hispanujo (S-ro Navarro) kaj du el Belgujo (f-ino Devos). Koran dankon al ĉiuj.

Ni jam respondis ĉiujn leterojn kaj esperas ke vi estas kontentaj.

Dume ni ricevis la lastan „poŝtmarkleteron”, de s-ro Kat el Nederlando. Ni tuj respondos.

Kiuj, el kiuj ajn landoj, sendos al ni novajn?

Libro-Servo, M. Tinxgracht 10, Edam, Nederlando.

## SKOLTA RUBRIKO.



La venonta jamboreo okazos apud Salzkammergut en Aŭstrujo, en aŭgusto 1951-a.

Mi konsilas al la esperantistaj skoltoj ke ili ne nur portu la verdan stelon, sed ankaŭ insignon kun la vortoj: „Parolas Esperanton”. La ne-esperantistoj vidos ke Esperanto vere ekzistas kaj ili faros demandojn.

Dum la lasta jamboreo mi estis tradukisto kaj vidinte mian insignon la aliaj skoltoj multe demandis pri la afero kaj kelkaj el ili fariĝis esperantistoj.

Estas dezirinde, ke ĉiu esperantista skolto akiru la insignon de skolta tradukisto. Por akiri ĝin necesas plenumi la sekvantajn taskojn: Babili pere de Esperanto. — Doni precizajn informojn kaj klarigojn pri turistaj aferoj dum vizito al sia urbo aŭ ĉirkaŭaĵo. — Legi kaj traduki tekston ne uzante vortaron. — Skribi leteron pri temo, indikita de la skoltestro. — Labori kiel tradukisto inter du diverslandaj homoj pere de Esperanto. — Kelkaj asocioj petas ankaŭ interŝanĝon de leteroj kun alilanda samideano.

Okaze de la transdono de la Petskribo al UNO profesoro Mello e Sousa, prezidanto de la Brazila skolta asocio, faris treege impresan paroladon, unue en la franca lingvo kaj poste en Esperanto, montrante la neceson de Esperanto por lando, kies lingvo ne estas multe studata eksterlande.

Zigzaganta Hipopotamo.

## RADIO-RUBRIKO.

**Prago silentas en Esperanto!** — La Esperantolingvaj dissendoj de la ĉeĥoslovaka radio, rekomencitaj en sept. 1945, atingis post 5-jara daŭro, en 1950, la respektindan nombron de preskaŭ 4000. Alvenis miloj da alskriboj el 32 landoj. Ĝuste post 5-jara ekzisto ĉiuj Esp.-dissendoj estis ĉesigataj samtempe kun multaj alilingvaj, same kiel en la pariza radio. Skribu multnombre al Ĉeĥoslovaka Radio (Esperanto-fako), Stalinova 12, PRAHA XII, Ĉ.S.R. por revivigi la tre aŭskultindan Verdan Stacion. Skribu afable. Multe valoros via peto.

**La sveda radio denove dissendas Esperantoprogramerojn.**

Bonvolu aŭskulti kaj sendi dankokarton aŭ -leteron al: Sveda Radio, Stockholm 7.

**Ankaŭ la turka radio intencas dissendi en Esperanto.**

La estraro de la radiofonio en Ankara diskutas pri dissendado en Esperanto. La tieaj iniciatintoj de tiu ideo petas vin skribi al la stacio por ĝin influi favore al tiu dissendo.

Adreso: Basin-Yagin, genel Müdürlüğü, Ankara (Turkujo).

Informojn pri Esperanto-radio-elsendoj sendu ne nur la radio-stacioj, sed ankaŭ la radio-aŭskultantoj al: Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, Tjerkwerd (Fr.), Nederlando.

# KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

**Britujo:** Kvindek knaboj, 13-15 j., dez. kor. kun geknaboj en ĉiuj landoj. Skribu al: S-ro Hatchkin, Elliston Secondary Modern School, Cleethorpes, Lincolnshire.

Knaboj en klaso 3-A (14-j.), Lyngton Sec. School, Dagenham, Essex, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Respondoj garantiataj. Skribu al H. G. Toms, en la lernejo.

**Bulgarujo:** Ramis S. Hasanov, „Marija Zujza” 3, Asenovgrad, dez. kor. per let. kaj il. poŝtk. kun ĉiuj landoj. Interŝanĝas poŝtm.

**Ĉeĥoslovakujo:** 17-j. junulo, Jaromir Krejci, Staromestské nám. 84, Mladá Boleslav 1, dez. kor. per. il. poŝtk. kun la tuta mondo.

**Francujo:** Dudek gekomencantoj, precipe gejunuloj, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Skribu al s-ro Gersy, Contres, Loir-et-Cher. Resp. certa.

**Germanujo:** Gerd. A. Fischinger (17-j. kompostisto) dez. kor. k. interŝ. pm. k. pk. k. ĉ. l. Schwenningen/N, Turnerstr. 63.

**Hungarujo:** Filatelistoj, il. pk.-kolektantoj en ĉiuj landoj skribu multnombre al Vilmos Radnai, Miskolc, Jókai u 14. Resp. certa.

**Nederlando:** Mi dez. kor. pri ĉiuj temoj, ankaŭ pri agrikulturo, kun la tuta mondo. W. Tesselaar, Stroet B 101, St. Maarten (NH).

12-j. knabino dez. korespondadon per bildkartoj kun samaĝuloj. Hedij Vršaj, Schanzerweg 37, Nieuwenhagen, L.

**Svedujo:** K. E. Johannesson, Öresundsvägen, Lund, dez. kor. kun ĉiuj landoj per il. poŝtkartoj. Respondo certa.

## KION DIRAS ALIAJ PRI ESPERANTO?

La oktobra 1950 numero de la nederlandlingva revuo „De Wereldspiegel” enhavas la gravan artikolon

„Esperanto meent het ernstig”.

Ĉiu ned. Esperantisto nepre ekkonu ĉi tiun opinion de ne-Esperantisto pri la Esperantismo.

Oni mendu la koncernan n-ron al la eldonisto: Drukkerij Rijnland, Alphen a/d Rijn. Prezo 0,60 guld.

Krom la supre nomita artikolo „De Wereldspiegel” enhavas ankaŭ dek tri aliajn gravajn, interesajn artikolojn kaj nombron da kuriozaj rubrikoj.

## Donacu esperantajon

okaze de la decembraj festoj! Per jarabono je „La Juna Vivo” (kosto 2,50 guld.) vi dum tuta jaro feliĉigas viajn geamikojn, junajn kaj maljunajn!

Bonvenaj certe ankaŭ estas:

**Internacia Kantaro „La Juna Vivo”**  
(30 kantotekstoj kun muziknotoj)

**Prezo nur 0,75 guld.**

**Bindita jarkolekto „La Juna Vivo”**  
(Belaspekta libro, enhavanta taŭgan materialon por ĉiu esperantisto. Aĉeteblaj nur de la jaroj '34/'35, '35/'36 kaj '36/'37.

**Prezo 1.— guld.**

Propagandu per la **TJO-poŝtpapero!**

La TJO-Libro-Servo povas peri por vi ĉiujn mendojn! Adr: M. Tinxgracht 10, Edam, Nederlando.